

NIA VOĈO
Madrída Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4^B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

APRILLO 2003

¡¡NUR PACO!!

La manifesto kontraŭ la milito legita post la granda manifestacio okazinta en Madrido la pasintan 15an de marto, kaj verkita de la portugala nobelpremiito José Saramago, estas legebla en esperanta traduko de la poeto Gonçalo Neves :

<http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/manifesto.htm>

IMITINDA

Toño del Barrio havas novan repagon parte en Esperanto, parte en la hispana, kie li inkludis informon ĝeneralan pri Esperanto kaj ankaŭ kelkajn novaĵojn, ambaŭlingve. Jen la baza adreso: www.telefonica.net/web/tdb La enhavo ĝenerala ne estas tre abunda. Enestas du biografioj kaj historiaj dokumentoj. Ankaŭ, cele al ĝenerala informado, li aldonis eble altiran pecon: la tradukon fare de Manolo Pancorbo de la fama Aserejé. Ĉar Toño estas novulo tiurilate, ĉiuj komentoj (formaj kaj enhavaj) estos ege bonvenaj.

TORRES QUEVEDO

Kiel estas konate, la fama hispana inĝeniero kaj inventisto Leonardo Torres Quevedo estis esperantisto. La pasintan 28 de decembro estis la 150 datreveno de lia naskiĝo. Por lin omaĝi dum pasinta marto disvolviĝis "Toreskevedaj tagoj" ("Jornadas Torresquevedianas") organizitaj de la Ŝtata Societo pri Kulturaj Kunmemoroj ("Sociedad Estatal de Conmemoraciones Culturales"), la Kolegio de Konstruaj Inĝenieroj ("Colegio de Ingenieros de Caminos, Canales y Puertos") kaj la Supera Konsilantaro por Sciencaj Esploroj (CSIC). La kunmemoro konsistis el serio da prelegoj pri diversaj flankoj de lia agado. Inter ili, Toño del Barrio havis la okazon prelegi pri la rilato de Torres Quevedo kun la lingvo Esperanto, la 20an de marto, en la sidejo de tiu Kolegio. Ĉeestis pli ol 50 personoj, ĉefe inĝenieroj kaj studentoj. La prelego vekis atenton, ĉefe pro ĝia noveco, kaj ĝi vekis reagojn de simpatio. Oni eldonos libron kun la teksto de la paroladoj.

MONDA TURISMO

En septembro, la eksterordinara ĝenerala kunveno de Monda Turismo, la esperanta turism-agentejo kun sidejo en Pollando, decidis pro financaj kialoj dissolvi la asocion.

EXPOLINGUA 2003

De la 20a ĝis la 23a Marto okazis en Madrido la 16a Internacia Foiro pri Lingvoj "Expolingua". Denove Hispana Esperanto-Federacio profitis tiun eventon por propagandi Esperanton. Ĝi havis malgrandan standon, la numeron 118, tamen oni sukcesis elmontri en tiel eta spaco plurajn gravajn librojn kaj revuojn. Oni disdonis abundan propagandan materialon al la multnombraj vizitantoj. Precipe vekis grandan intereson la brosureto pri Esperanto en Interreto, enhavanta plurajn interesajn retligilojn. Inter la afiŝoj montritaj troviĝis foto de la fama retserĉilo "Google" en sia esperanta versio.

Krome, nia samideano José María Salguero veturis speciale al Madrido por prelegi hispanlingve en la kadro de Expolingua pri la temo "Qué es el Esperanto". Li trafis prezentis la cefajn trajtojn de nia lingvo per projekciado sur ekrano de pluraj gramatikaj ekzemploj. La alloga simpleco de nia lingvo vekis grandan intereson inter la ceestantoj. (Darío)

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3^o-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelegoj: 21-a de aprilo. 19,00. "Eŭropa Kongreso en Verono" Angelita Sanz

LOTADO DE VORTAROJ

Kiel aprobis la Generala Asembleo oni lotis 5 ekzemplerojn de la granda hispana-esperanto vortaro de Fernando de Diego, kiu aperos en julio. La kondico por esti premiita estis la pago de la kotizo de MEL de la lastaj tri jaroj antaŭ la 28-an de februaro. La 5 premiitaj estis

- 1.- Emilia González
- 2.- Darío Rodríguez
- 3.- Pedro A. Garrote
- 4.- Pepe Platas
- 5.- Miguel Fernández

Atentu ke gis julio ne aperos la libro. Ni informos kiam la ekzempleroj estos je via dispono.

REELDONO DE "Nuevo método de esperanto", de Fernando de Diego

Prezo: 7,52 EŬR inkludas impostojn sed ne sendokoston. Rabato: 20% se vi aĉetas 10 aŭ pli da ekzempleroj. Petu al: Esperanto Liceo de Madrid. admin@esperanto-es.net

RADIO VATIKANA, ELSENDOJ

Radio Vatikana, kiu ekde 1977 elsendas en esperanto per mezaj, kurtaj kaj ultrakurtaj ondoj estas aŭdebla tri fojojn semajne, lastatempe ankaŭ per interreto.

DIMANCE- daŭro 9' 20". Frekvencoj: mezonde 527 kaj 1530 kHz. Kurtonde 4005 kaj 5885 kHz. Satelite: Eŭtelsat 2 (13°E) transponder 54 (Bouquet Rai), vertikala polarizado, 11804 Mhz, aŭdkanalo 128 Kbit/s

La dimanca elsendo estas ripetata je la mezeŭropa horloga horo 23,50, per la mezondaj frekvencoj.

MERKREDE KAJ JAŬDE- daŭro 9'. Frekvencoj: mezonde 1260 kaj 1611 kHz. Kurtonde 7250 kaj 9645 kHz. Satelite: Eŭtelsat 2 (13°E) (Telespace) Frekvenco: 11804 Mhz, vertikala polarizado. F.E.C.; 2/3, dua aŭdkanalo.

Oni povas aŭskulti ankaŭ per interreto: www.vaticanradio.org

VENONTAJ KONGRESOJ

2003 55-a IFEF Kongreso. 10-16 de majo. Dresden (Germanio)

2003 Kongreso de "L'esperanto en France". 29 majo- 1 junio. Gresillon (Francio)

2003 88-a UK. 26 julio - 2 aŭgusto. Göteborg (Svedio).

INTERRETA ESPERANTA PORTALO

www.gxangalo.com

LICEA KOTIZO POR 2003

La MEL-kotizo por la jaro 2003 estas sama ol la lastaj naŭ jaroj (12 EŬROJ). BV. pagi ĝin per ĉeko po 12,90 eŭroj (inkludas bankkostojn), je la nomo de Esperanto-Liceo de Madrid per banko: Banco Atlántico: 0008/0110/97/1120/404200, (sama nomo) aŭ rekte al la kasisto lunde vespere en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4ºB. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal